

Jacques-Nicolas Goulé,
La suisse au bord
du lac

Jacques-Nicolas Goulé,
Kara Svisujo

tradukita de Paul Bennemann

.....
.....
.....
.....
.....
.....
.....

Dolĉa odoro leviĝas el floroj,
milde la nokto klinas sin al la ter'.
Nun per plej brilaj lumoj kaj koloroj
Alpo-pintoj sin ornamas je l' versper'.
Kara Svisujo, mia hejmland'!
Ĉiam ankaŭ en malproksimo
vin gloras mia kant'.

.....
.....
.....
.....
.....
.....
.....

Gaje promenu kun manoj interplektitaj;
dolĉe aŭdiĝu kelka frata vort'.
Kantoj eksonu! Ĉarme reĵetitaj
ili tuj revenos de la laga bord'.
Kara Svisujo, mia hejmland'!
Ĉiam ankaŭ en malproksimo
vin gloras mia kant'.

.....
.....
.....
.....
.....
.....
.....

Hela la luno jam tie supreniras,
venas al ni arĝenta ĝia bril'.
Aŭdu - de l'montoj kornosonoj tiras
nin al hejmo, al ripozo en trankvil'.
Kara Svisujo, mia hejmland'!
Ĉiam ankaŭ en malproksimo.

*Verkinto de tiu ĉi Franca poemo estas
Jacques-Nicolas Goulé.*

*Arg-1028-2084 (2014-05-28
19:11:45)*

*Indikoj pri la origina tek-
sto kaj la aŭtoro troviĝas en
[http://www.worldcat.org/
search?q=au3AGouleMF%2C+
Jacques-Nicolas%2C&qt=hot_
author](http://www.worldcat.org/search?q=au3AGouleMF%2C+Jacques-Nicolas%2C&qt=hot_author), sed ne la teksto mem.*

*Traduko de la Franca poemo "La suisse au bord du lac"
de Jacques-Nicolas Goulé en Esperanton de PAUL BENNEMANN
(*1885-03.13 - †1954).*

Arg-1028-2085 (2014-06-25 17:54:00)

*Tiun ĉi kanto-tradukon mi, Manfred Retzlaff, trovis en la libro
"Internacia Kantaro", eldonita en 1922 de la eldonejo Ferdinand
Hirt und Sohn en Lepsiko (Leipzig), Germanio. La kantojn ko-
lektis kaj eldonis Paul Bennemann. La teksto troviĝas ankaŭ en
http://kantaro.ikso.net/kara_svisujo.*